



AVENO 17 - Februaro 1998

Karaj amikaj verduloj,

mi salutas vin ĉiujn okaze de la jarfino (almenaŭ la kristana kalendaro) kaj deziras sukceson en via laboro kaj bonfarton. AVE estas reto por tiuj, kiuj laboras en kaj ekster la verdaj partioj favore al ekologio kaj socio.

Nia filozofio estas (ekde la fondiĝo de AVE en 1984): Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo. Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj lingva neŭtraleco, mond vasta aplikebla facileco adekvatas al la ekologia principo "Eta estas bela". Niaj konkretaj programoj paralelas al la "Programaj Gvidlinioj" (Masala ĉe Helsinki, 1993) de la EFGP (Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj).

Statistiko de AVE: 242 individuaj membroj, el tiuj 62 virinoj; en Afriko, Ameriko 14, Azio 10, Aŭstralio 13, Eŭropo 199. 35 estas membroj de iu verda partio.

Do, la nombro de ekologie kaj sociale konsciencaj esperantistoj pli kreskas; paralele nia estimo je niaj amikaj verduloj same kreskas. Kaj ni kunlaboras kun verdaj partioj, kies membroj ni (...% de AVE-anoj) estas, respektive kun federacioj de verdaj partioj (Eŭropo kaj Ameriko).

Je la Konsilio de EFGP 1998-03-28 en Helsinki okazos diskuto kaj espereble akcepto de AVE kiel observanta grupo en kadro de EFGP. Mi veturos tien kaj petis AVE-anojn el Finnlando, Svedio kaj Estonio helpi je informado. Krom tio ni kunlaboras kun aliaj Ne-Registaraj Organizaĵoj en Esperanto (SAT, TADEN, BEMI, Vegetaranoj) kaj kun ne-esperantistaj NRO-oj en aliaj lingvoj.

Fiksdatoj:

Kompreneble ne ĉiu AVE-ano povas partopreni je niaj renkontiĝoj. Tamen mi ĝojas, se vi venas al unu de tiuj AVE-renkontiĝoj. Ĉiuj estas publikaj. Same mi ĝojas pri leteroj; kvankam mi rekte nur respondas kiam venas grava demando.

Dresden 1998-05-31: se iu el la germanaj AVE-anoj pretas organizi renkontiĝon (bv. respondi al mi) - okaze de la GEA-kongreso. La titolo povus esti: AVE-kunsido pri verda (ekologia kaj sociala) movado en meza kaj orienta Eŭropo.

Montpellier: Tutmonda AVE'98: 1998-08-01/08 (2 h) okaze de la 83-a UK de Esperanto; tie ni havos publikan du-horan AVE fakkunsidon kun la temoj:

- Politikaj Gvidlinioj de la Eŭropaj Verdaj Partioj.
- Agadoj okaze de la baloto al la Eŭropa Parlamento.
- Informo pri la AVE seminario pri Verda Politiko.

AVE-seminario pri Verda Politiko '98:

Dank' al niaj francaj geamikoj Marie-Pierre kaj Victor Sion ni organizas AVE Seminarion pri Verda Politiko (ne nur en Eŭropo) 1998-08-08 / 11 (vendrede vespere, je la fino de la UK en Montpellier - ni organizos la veturadon tien) Larzak' havas longan pacifisman tradicion kaj interesan ekologion de karsta grundo.

Temoj / Aranĝoj:

1. La Politikaj Gvidlinioj de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj; inkluzive de la aktualaĵoj rilate la baloto por la Eŭrop-Unia Parlamento.
2. Lingva Politiko en Eŭropa Unuiĝo kaj similaj superĝatoj.
3. Tutmondaj Ekologiaj Problemoj (ekz-e la Aral-Mara Regiono)
4. Dimanĉe: Ekologia Migrado tra la Regiono (eblas bani en rivero).

Invitataj estas gastoj:

1. Pri lingva politiko en Eŭropo (eble Pirlot, Erasmus, ..).
2. Verda Politikisto, plejeble el Francio, kiu kunlaboras kun la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj.
3. Membro de la Federacio de Eŭropaj Junaj Verduloj.

Kongreskotizo:

Antaux 1998-03-15 (dato de la aliĝilo/transpago): 50 nlg (pagipovuloj).

Poste: 80 nlg (pagipovuloj, depende de liberaj lokoj).

Kotizo por nepagipovaj partoprenantoj: 0 nlg; akcepto laux la nombro de liberaj lokoj kaj laux la datumo de via aligxo !

Bonvolu sendi la kotizon al nia UEA-konto :

avex-z kun indiko: Larzak kaj VIA NOMO

Bonvolu sendi vian aligxilon (eblas neformale) kun la necesaj informoj pri:

Tranokto kaj mangxado (vegetarana; prezoj laux malsupra listo) pagontaj surloke en FF.

Veturado (komuna aŭ individua, kun aŭ sen ebleco kunporti pliajn partoprenantojn) al la "lokaj" organizaĵoj:

Marie-Pierre kaj Victor Sion, Chemin de Fontinettes F-59522 Lambres-Les-Douai, fakso : 33 3 27 97 87 87 e-posxto: mpsion@nordnet.fr

Adreso de la seminaria loko en Larzako (Larzaque) apud Montpellier:

Ferme d'accueil de La Salvetat, 12230 La Couvertoirade tel : 33 5 65 62 22 65, fakso : 33 5 65 62 14 79

La buso haltas 9 km antauxe, la trajno haltas en Millau (35 km) kaj Montpellier situas 100 km for de La Salvetat. Ni organizos veturon el M.

Nokto + matenmangxo kostas 135 FF (215 FF por du personoj en la sama cxambro).

Nokto + matenmangxo + vespermangxo kostas 200 FF (345 FF por du personoj en la sama cxambro).

Nokto + tri mangxoj kostas 265 FF por unu persono, 475 FF por du personoj en la sama cxambro.

Sub granda tendo (komuna dorm-cxambro kun 12 litoj), nokto + matenmangxo kostas 65 FF (necesas havi dormsakojn).

En propra tendo, unu nokto kostas 18 FF por unu persono, (ruldromo ; 22 FF), matenmangxo kostas 30 FF, tagmangxo aux vespermangxo kostas 65 FF.

Bonvolu partopreni la Verdajn Seminarion por lerni, diskuti kaj ĝui.

IJK en Maribor :

eble Tatjan Auderskaja, el Odessa, povos prezenti AVE.

Ĝenerale pri AVE:

AVE vivas de la informoj kiuj venas el diversaj fontoj: el APC-reto (Alternativa kaj Progresema Komunikado), el gazetoj kaj ĵurnaloj, el informoj de vi, karaj AVE-anoj.

La amplekso de nia duonjara AVENO mi ne volas altigi; do, sendu mallongajn informojn, ekz-e pri balot-sukcesoj de vialanda verda partio, a~u pri iliaj programeroj al AVE. Se vi povas skribi ampleksan artikolon pri ekologia kaj sociala afero el via lando a~u el nia ter-globo, bv-u sendi ^gin al la VERDire-redaktoro:

Dáithí Ó hEalaíthe, 54 Pairc Eabhara, Beann Eadair, Co. Bh.A.C., (Irlando); e-po^sto: dhealy@vax1.tcd.ie .

Mendi VERDire (anka~u provokzempleron) vi povas je: Verdaj Brigadoj, (Andrzej Zwawa), Slawkowska 12/24, PL-31-014 Krakow (Pollando). ^Gi kostas 25 NLG por 4 numeroj, pagebla al la UEA-konto vrdr-d.

Mi, kiel sekretario de AVE elkore dankas por mon-donacoj kaj deziras ke la~ueble pluraj donacos al nia UEA-konto (avex-z) aux rekte al la sekretario, por la afranko-kason.

^Car ni ne volis regulan kotizon tiom longe kiam eblos (^car tio signifus, ke necesus kasisto (k.t.p.), mi petas financan kontribuon la~u viaj eblecoj; la regulaj jaraj AVE-elspezoj (inkluzive de afrankoj) estas ^cirka~u 1200 NLG; tio signifas ^cirka~u 5 NLG po AVE-membro - eble duono el la AVE-anoj vivas en malri^caj landoj; tio signifas, ke 10 NLG sufi^cos kiel - libervola - jara financa kontribuo.

La~u mia opinio la donacintoj devus aperi ^ci tie. La nuna listo estas sufi^ce longa, ^car validas por kelkaj anta~uaj jaroj. Do, AVE ricevis donacojn: en la jaro 1995: M. Schaeffer 20 DEM, S. Burnett 10 DEM, A. Eder 5 DEM, H. Tani 292 NLG, S. deWeerd 27 NLG. 1996: E. Blasius 800 CZK, A. Altherr 300 CZK, C. Llapart 10.000 ESP, E. van Damme 27 NLG, H. Bakker 20 NLG, U. Haas 10 DEM, M. Westermayer, min. 140 NLG. 1997: E. van Damme 27 NLG, M. Westermayer 1067 DEM, Zhong Q. 50 USD, U. Haas 25 DEM. Mi tre ^gojas pri tiuj donacoj kaj tutkore dankas al ^ciuj donacintoj - kaj anta~udankas al la donacintoj. Krom tio ni havis enspezojn, ekz-e por venditaj VERDire: 1995: UK en Tampere 25 DEM. 1996: okaze de AVE-kunsido en Stuttgart 55 DEM, ISo 15 DEM. UK en Prago (vidu je donacoj).

AVE havas regulajn kostojn (NLG): UEA-kotizo por asociita fakasocio (jare 100). Salono je UK por renkonti^gi dum 2 horoj (160). Mendo de po 20 ekz-oj de VERDire (2 * 125). AVE-Nova^joj (AVENO) inkl. afranko (dufoje jare) (400). Elektronika po^sto (duone ^car mi anka~u uzas ^gin private) 120. Afranko por AVE-rilataj leteroj (minimуме 100). Kopiado de informiloj (ekz-e Gvidlinioj de EFGP, kaj pri la Aral-Mar) 100; sume 1230 NLG.

Krom tio ni subtenas la~u-okaze, ekz-e: Libro kaj informiloj por prezenti AVE aliloke (Assisi, Niamey) (400 NLG en 1997). Krom tio mi petas vin subteni nian Aral-Maran agadon (en 1997 AVE pagis 100 DEM kaj komence de '98 300 USD al Perzent; pli pri la Aralo en mia raporto).

Se Vi havas informojn, kiuj povus interesi la aliajn AVE-anojn, bv. skribi al mi; longaj artikoloj estu por VERDire - la ekologiisma ^jurnalo en Esperanto, kiu indas aboni por propra utilo kaj por montri ^gin al niaj ne-esperantistaj geamikoj (vidu supre).

Raportoj:

Tutmonda AVE'97: 97-07-26 en Adelajde (A~ustralia), okaze de la UK de UEA. Aldo Foa organizis tie^ci AVE-kunsidon kaj informis pri la celoj de AVE. Pluraj interesuloj partoprenis kaj eble iu de vi a~ustralianoj povus skribi ion pri ekologio, sociala vivo kaj Homaj Rajtoj (rilate la indi^genoj) en via kontinento. Kaj eble pretus servi kiel sendanto por A~ustralia

(fari kopiojn kaj sendi al 12 pliaj adresoj).

Int-a Junulara Kongreso (TEJO): 97-07-24 en Assisi (Italio) "La homo. ^Cu super a~u parto de la naturo". Krayg organizis publikan AVE-kunsidon kiu malgra~u granda konkurenco sukcesis.

Renkonti^go de E~uro-Afrikaj Verduloj 97 estas ^sovita al fino de 1998 kaj okazos ver^sajne en Burkia-Faso. Dank' al Hans Bakker mi povis sendi materialon al Semedo en Niamey. Benda~urinde la kongreso estis prokrastita al fino de 1998. ^Ciukaze ni nun havas amikojn en Niamey kaj Cotonou (Sebastien).

E~uro-Azia AVE'97: 97-08-09 en Jekaterinburgo (Ruslando) okaze de EA'97. Krom la ^generalaj informoj pri AVE kaj la Verdaj Partioj ni diskutis pri: Ekologiaj Problemoj, Dauripova Evoluo, Biodiverseco kaj Resursoj - en Siberio, Aral-Mara regiono, Bering-Mar. Mi almetas partojn el mia voja^g-raporto. Kompletan, inkluzive Kiev, mi sendos se vi deziras.

Raportoj de la sekretario:

Je la 1-a de Majo mi veturis el Kiev al Berlino por partopreni je la Konferenco de la E~uro Federacio de Verdaj Partioj (inter Portugalio kaj Georgio kaj inter Finnlando kaj Maltujo). La diferenco inter la reloj kosis 7 horojn (2 je la ukraina landlimo, 3 en Varsovio kaj 2 je la germana limo, ^car la vagonoj ne estis akceptitaj pro diferenco je la pufro-altecoj ! En Berlino mi havis inform-standon pri Esperanto kaj AVE, kiun vizitis pluraj el la partoprenantoj kaj vizitantoj de alia e~uropa okaza^jo. Ni diskutis pri la lingvo-uzado kaj (teoria) lingva egalrajteco en la E~uropa Parlamento. El malgranda enketo (n=8) rezultis, ke post la ali^go de pluraj orienteuropaj landoj necesas rezigni pri la lingva egalrajteco en la parlamento, pro la eksplodo de la necesaj interpretistoj. Al la demando, kiom da lingvoj por estonta EP / EU kaj kiuj, mi ricevis je ^ciuj, ke reduktado al 3-4 laborlingvoj (angla, franca, germana kaj parte la rusa por orienta E~uro) necesas kaj duono de la enketintoj akceptis la rolon de Esperanto kiel 4-a a~u 5-a laborlingvo por reprezenti la ne oficialajn lingvojn en la EP.

Pentekoste mi partoprenis en Stuttgart je la E~urop-Unia Esperanto Konferenco kaj tie renkontis kun aliaj AVE-anoj kaj interesuloj. Ni petis la organizantojn de la venontjara Universala Kongreso en Montpellier, ne varbi por virbovo-batalo; ili diris ke ^gi ne estas humiligo de la besto kiel en Hispanio, ^cu ? Krom tio ni fiksas la organizon de la unua Seminario pri Verda Politiko en Esperanto. En A~ugusto mi voja^gis iom: Mi vizitis geamikojn en Brest kaj la NRO "Medio kaj Mi", kiu petis pri dentisto-aparataro, ^car la dento-saneco estas malbona - parte pro alta kontento da pezaj metaloj en la trinkakvo.

En Moskvo, kie Irina (?) akompanis min afable, mi renkontis kun radikala kaj anar^hista esperantistoj kaj diskutis pri iliaj programoj; kiuj parte kongruas kun la verda, ekz-e ili subtenas la alternativan civilan servon anstata~u la militservon. Ni verduloj estas (plie) reformistoj. Tamen ideologio estas unu afero kaj samideana interparolado alia afero. ERA e^c intertempe tradukis nian AVE-tekston en la rusan - ne forgesinte varbi por si mem. ^Car la teksto estis tro komplika mi resignis publikigi ^gin.

Survoje al Ekaterinburgo mi vidis agro-kompleksojn kun centoj da bovinoj sur la pa^stejo. En la studenta hotelo mi lo^gis kune kun Kjell kaj tie renkontis 3 studentinojn el Novo-Uralsk - malfermita urbo; ili i^gos in^genier-instruistoj en

firmao kiu nomi[^]gas Uran. Do, mi povis iomete paroli pri kemiaj analizoj kaj riskoj; kaj ni interesigis ilin por Esperanto. La E~urop-Azia Esperanto-Kongreso en Ekaterinburg estis ne tro granda, sed tamen interesa. Mi prezentis AVE kaj ni diskutis pri dependeco inter ekologio kaj ekonomio; ekz-e rilate laborlokoj en lokaj instala[^]joj, kiuj [^]sparas energion. Mi vizitis la naturhistorian muzeon, kiu montras anka~u rilatojn inter la diversaj plantoj kaj bestoj, kaj varbas por protektado de la protektitaj plantoj kaj bestoj - ili e[^]c eldonas ekologian gazeton por la Ural-Regiono en la rusa.

El E-burg mi voja[^]gis al Ta[^]skent per trajno dum 57 horoj. Ni pasis Akmola, nun [^]cefurbo de Kasahxio. Je la haltoj eblis a[^]ceti varojn sur la perono. Bongustajn man[^]ga[^]jojn kaj e[^]c novajn biciklojn (klapeblaj), kion ricevas la laboristoj kiel salajro ! Mi vidis 3 kamelojn kaj ni preterpasis dum duona tago la Balhxa[^]s-Lagon. En Ta[^]skent mi tranoktis [^]ce familio de biologino kaj geologo – biciklis- toj; ni parolis pri la ekologia kaj ekonomia situacio. Ni vizitis la novan besto-[^]gardenon, kiu estas kopio de la Moskva zoo - malgra~u la alia klimato. Tie oni bredas sukcese diversajn bestojn.

Tuttaga ekskurso per a~utomobilo al la [^]Cervak barlago (reloj ekzistas [^]gis la lago), situante 40 km oriente de Ta[^]skent kaj 1000 metroj super la mara nivelo en la komenco de la Tien-[^]san montaro. Tie estas bona aero, lago por bani - ankora~u mankas konvenaj instala[^]joj por lo[^]gi tie. Grandegan turisman komplekson oni ne finkonstruis; [^]gi estus tro granda por la lago. Uzbekio volas evoluigi mediafablan turismon. Supren la~u la [^]Cervak rivero oni povas iri [^]gis la landlimo al Kirgizio; la vegetacio estas interesa, spicaj kaj sanigaj herboj, migdalaj arbetoj kaj pistakujoj.

Uzbekio havas 3000 jaran historion, sed [^]cefe interesis min la situacio de la Aral-Mar, kiu ne plu ricevas akvon. AVE eldonis bro[^]sureton pri tiu [^]ci problemaro. Por planti kotonon kaj rizon oni mortpafis per ma[^]sinpafiloj tie vivantaj kapreolojn kaj la lupojn (romano de [^]Cingis Aitmatov), kaj oni konstruis kanalojn, por uzi la akvon de la du riveroj, Amu Darja kaj Syr Darja. Do, nuntempe la rivera akvo ne plu atingas la Aral-on. Sekve [^]gi redukti[^]gas de jaro al jaro kaj sekve la saleco alti[^]gas kaj pro la multaj agrokemia[^]joj la akvo-sitacio estas malbone - plej multo de la fi[^]sospecioj ne plu ekzistas, la [^]ce-mara arbaro kun granda biodiverseco preska~u ne plu ekzistas - pro tio anka~u la sova[^]gaj bestoj formortis. [^]cu estas granda konsolo, ke en Nukus, [^]cefurbo de Karakalpakio sude de la Aral-o situas tre bona muzeo, kie la historio de la lago estas zorgeme kaj belaspekte konservata? Krom tio estas tie belarta muzeo.

La pentristo Grigori Ulko el Samarkand pentras pri la vivo [^]ce la Aralo; kaj pentrante sekvis la malpliboni[^]gon de la tuta vivo, trafante de la manko de akvo. Li [^]satas ekspozicii siajn bildojn en la okcidento - kiu vidas eblecon kaj povas helpi la organizadon.

Dank' al Murodkul Rozikov mi povis viziti la oficejojn de UNDP (Evoluiga Programo de la UN) en Ta[^]skent kaj Nukus kaj la [^]cefon de la kvin-[^]stata oficejo rilate la akvo-mastrumado en la Aral-Regiono (EC-IFAS), s-ro Giniatullin. Alia institucio kiu komencas vere trovi solvon estas WARMAP (Akvo de Aral Regiono Mastruma Programo (a~u simile)), subfako de TACIS (Teknika Helpejo por la eks-sovetiaj landoj); ili nun almena~u mezuras kaj pripensas, [^]san[^]gi la agrikulturon uzante malpli da rivero-akvo. Bernard Leservoisier (UNDP) plantigas zonon de arboj [^]cirkau la urbo Nukus por plibonigi la mikroklimaton kaj protekti la homojn kontra~u la fajna polvo je ventegoj, kiuj malhelpas la spiradon. Dank' al s-ro Kamalov mi renkonti[^]gis kun D-rino Oral Atanyazova (NRO: Perzent), kiu servas por la patrinoj, kiuj havas la plej malfacilan vivon tie. [^]Si trovis por nia

Aral-agado eblecon uzi nian malaltan bu[^]geton (intertempe 360 usd) por plibonigi la medion rilate organika agrikulturo, planti arbojn (kiujn ??) kaj plibonigi la trinkakvon. Mi scias ke nia kontribuo estas malgranda - tamen mi fidas al [^]si, ke la mono estos bone uzata.

En Samarkand mi vizitis la Muzeon de Solidareco kaj Paco, kie Anatoli Iunusov pere de Esperanto kaj pluraj aliaj lingvoj aran[^]gis ekspozicion de kontra~u militaj afi[^]soj, k.t.p.; kaj pli grave anka~u prezentas pacigajn afi[^]sojn kaj tekstojn. Redukti krizojn kaj helpi al la popoloj superi politikajn problemojn sen milito estas la plej granda provoko kaj tasko. Beda~urinde KSKE (konferenco por sekureco kaj kunlaboro en E~uropo) havas ver[^]sajne malpli da mono ol NATO povas elspezi por afranko.

Pro manko da tempo kaj neklaraj eblecoj mi uzis aviadilon al Tehran. La flugo super la kanaloj, la Amu-Darja rivero kaj la Turkmenba[^]si-kanalo (kiu deprenas la akvon el la Aral) montris ke la kanaloj fini[^]gas en lagoj en la dezerto; [^]sajne tiuj lagoj ne havas verda[^]jojn [^]cirka~u si; do, la akvo simple vapori[^]gas kaj eniras en la grundon.

En la flughaveno de Tehran la kontrolistino [^]sajne ser[^]cis porno-bro[^]surojn, sed ne interesi[^]gis pri miaj multaj tekstoj; inkluzive de AVENO 16, kiu enhavis kritikan artikolon pri la irana sistemo.

Dum la semajnfino Sadeg kaj ? veturigis min al Borujerd, kie estas vigla Esperanto asocio. Survoje situas la nova, giganta mauzoleo por Imam Khomeini kaj la estonta aeroporto 50 km for de Tehran (espereble ili instalos bonan publikan trafik-sistemon). Borujerd estas urbo kie multaj biciklas, [^]gi situas inter ne-verdaj montoj. En la verda valo ekster la urbo familioj faris piknikon – e[^]c lavas la a~utomobilojn en rivereto; mi esperas ke iam ili ekscios, ke tio estas malbone por la esta[^]joj en la rivereto. Vespera festeto kun dungitaj muzikistoj de la radio-stacio; ili ludis melodiojn de la araba, irana kaj kurda etnoj - kaj ili klarigis la diferencojn. Dank' al Masud mi povis viziti la teksa[^]j-fabrikon. [^]Gi estas bone ekipita - inkluzive de purig-instala[^]jo – oni ofertas al la laboristoj moskeon, vendejon, sportejojn kaj ban-halon. Kune kun profesoro Pakravan ni plurfoje renkonti[^]gis kaj diskutis pri lingvoj kaj pri politiko. S-ino Pakravan diris, ke akcepto de uzo de la [^]cador' kiam [^]ceestas ne-familiaj viroj, estis privata religia afero kaj nur nun anka~u [^]state devigata; aliaj virinoj hejme ne portas la [^]cador', kiam venas vira gasto.

Ni reveturis per buso al Tehran dum 4-5 horoj; (halto okazis en Ghom) en tiaj busoj ne estas dividu inter viroj kaj virinoj, [^]car oni devas mendi sidlokon; sed en en-urbaj busoj viroj devas esti anta~ue kaj estas divido-baro - strange.

Mi esperas, ke la [^]satata prezidento faru politikon, kiu respektas la homajn rajtojn, ekz-e libereco je elekto de religio kaj je esprimado de sia opinio.

Mi vizitis novan kulturdomon, konstruita sur loko kie estis Bahai-tombejo, kiu nun situas alie. Ekspozicio pri la atakoj de Irako montris la dama[^]gojn; la~udire Irako montris ke kemio-armilo povis mortigi tutan vila[^]gon (8.000 Kurdoj) - tiu [^]ci gento beda~urinde nenie havas hejmlandon. Krome ni vizitis arto-galerion, gvidata de esperantisto; tri virinoj lernis pentri - unu el ili pentris malpli realeca - tre alloga. Krome mi vidis bildon kiu montris Jesuon.

La trafiko en Tehran estas terura - ili devus finkonstrui la metroon - a~u trovi alian eblecon. Eble pli facile estas konstrui super-teran veturilon por publika transporto kiel en Wuppertal, Germanio (t.n. Schwebe-Bahn, pendanta trajno). Necesas plurfoje [^]san[^]gi inter buso kaj taksio. Pro tio ne eblis viziti la naturhistorian muzeon.

Mi rajtis viziti prelegon de esperantistino de la tehrana universitato pri valuto-problemoj; kaj poste la [^]ceestantaj

docentoj kaj profesoroj diskutis kun mi pri la diferenco inter islama kaj okcidenta lando (sekureco, libereco, ekonomio kaj ekologio). Mi spertis, ke (eble dank' al la nova prezidento ?) la homoj ne timas diskuti eĉ tiklajn temojn.

Irano estas vizitinda lando (...). Por virinoj la devo porti la ĉador' certe ĝenas - sed alimaniere mi vidis, ke virinoj tute libere kaj eĉ nokte estas surstrate kaj ne timas atakojn de "sovaĝaj" viroj.

Mi deziras reformojn al pli demokrata kaj liberecana politiko, sen perdo de orientiĝo, kio estas problemo en okcidentaj landoj. Mi jam spertis, ke tutmondiĝo de malbona kulturo ne estas haltigebla - en Borujerd mi televidis filmon matene kiu laŭ mi devus esti malpermesata: temis pri truk-filmo, vetveturado de fantaziaj aŭtomobiloj kun aŭsoforoj kiu aspektis kiel robotoj kaj kiuj ĝatis fi-agi unu kontraŭ la alia. Finfine mi denove tre dankas al ĉiuj miaj gastigantoj kaj helpantoj.

Informoj el la tuta mondo

Negativaj aferoj:

La registaro en Taiwan malĝustas la "nelegalajn" radio-staciojn, kiuj prezentas la politikajn opiniojn. Nova leĝo tre subpremas tiajn amas-komunikilojn, kiuj servas por plia demokratiigo. Bv-u peti de la taiwan-a registaro (al la ministerio por eksterlandaj aferoj: eyes@mofa.gov.tw) ke ili akceptu la liberan parol-raĵton (Verda Partio de Taiwan, APC-reto)

La urbo Fukuoka en Japanio planas artefaritan insulon (401 ha) antaŭ la tajda strando; tiel detruos la ekosistemon. (H. Tanaka)

Pro la halogenizitaj kemiaĵoj (ekz-e Freon) kiuj vaporiĝas en la stratosferon kaj pro la klimataj kondiĉoj la ozon-kontento estas reduktita je 40% en la arkta regiono, eĉ pli grave en la sud-polusa regiono. Necesas haltigi la produktadon kaj uzadon (finfine ankaŭ en la medicino) de tiaj helpenzoj. (Nature'97, Vol.390, 214)

En Kyoto la ŝtatoj ne sukcesis akcepti daŭrigeblan vojon je reduktita uzado de oleo kaj karbo. La averaĝa procentaĵo de redukto ĝis 2012 je 5% estas tro malalta. La verdulojn prezentis Heidi Hautala, MEP, el Finnlando. (Update EFGP)

La genteĥniko progresas en "ĉiuj!" sferoj. Plantoj, mikroboj kaj bestoj estas ĝisgigitaj genetike - parte oni povas kompreni la strebojn, se temas pri genetikaj malsanoj (ĉu iu de tiuj jam estas savebla - mi ne scias?). Diskutindas la etikaj problemoj, ĉu ni rajtas tiel profunde ĝisgigi la genetikajn originalaĵojn? La kritikuloj antaŭvidas riskojn, kiuj similas al la nehaltebla nuboj de Ĉernobyl. Ekz-e povus esti, ke rezistoj je antibiotenzoj pliiĝos.

La EP-Verduloj verkis mocion por la EP kiu pritraktas la etikajn kaj leĝajn vidpunktojn rilate la gen-manipulado kaj artefarita fertilizo.

Kvar landoj (Britio (33%), Germanio (33%), Italio (21%) kaj Hispanio (13%)) evoluigis kaj nun decidis konstrui la t.n. Eurofighter (Eŭro-batalanto). Unu de la decidaj punktoj estis la laborlokoj; tamen, je tiu ĉi sumo (33 Mrd. DMK) sole por Germanio (mendo de 140 ĉasaj kaj 40 bomoĵetaj aviadiloj), oni povus krei pli multajn laborlokojn en publika trafiko kaj uzado de daŭrigebla energio.

Krom tio la reduktado de krizoj fare de OSKE povus pli efike uzi parteton de ĉi tia monsumo.

La nuna EU-leĝo pri malfermo de la kurento-merkato signifas, ke lokaj profitoj aŭ pagoj favore al la komunumo reduktiĝos. Pro tio surlokaj (pli) medi-konformaj produktadoj - pere de vento, akvo, kaj fotovoltaike - spertos malavantaĝojn. Restos eble pagado por la dratoj.

Positivaj aferoj:

Irano ratifis la UN-konvencion kontraŭ kemiaj armiloj. Post Hindio, Jordanio, Pakistano kaj Rusio subskribis 104 ŝtatoj.

La Nobel-premion por la Paco ricevis La Internacia Kampanjo por Forigo de Grundminoj pro la sukcesoj kontraŭ grundminoj. Finfine jam multaj ŝtatoj ratifikis la konvencion. AVE kolektis je la UK en Tampere, dank' al Mark Fettes, kelkdekon da subskriboj kaj sendis ilin al la UN-oficejo en Genevo. Krom tio mi certas ke pluraj el la AVE-anoj kolektis surloke pliajn subskribojn.

La transporto trans la Alpoj devos uzi prefere la fervojon; dank' al la svisa sistemo de rekta demokratio.

Universalan Deklaracion de Bestaj Rajtoj en Esperanto mi ricevis de Ute Haas kaj Germain Pirlot. Mi kunportos kopiojn al nia kongreso. Krom tio estis artikolo pri la malbonaj efikoj de ĉasado de bestoj laŭ biologia vidpunkto (Nature'98, Vol.391, 22).

UN eksciis, ke necesas interplekti la median programon kun la evoluiga por trovi daŭrigeblan vojon. Tio rilatas konvenciojn pri arbaroj (IPF), klimato (FCCC), maroj (UNCLOS), dezertigo kaj grundo (CCD), Antarktiko kaj kemia sekureco (IFCS).

Filozofiaj tekstoj: Homekologio (J. Karhan) kaj La Nova Realismo (B. Vogelmann) montriĝas, ke esperantistoj tre sinceraj pri la estonteco. Interplekto de la homa sfero kun la medio ja mankas iom en niaj tradiciaj religioj.

Aktualaj Konsiloj de AVE rilate ŝparado de elektra energio: Se vi uzas viajn aparatojn saĝe, vi povas ŝpari monon kaj la medio gajnos: Malŝalti televidilon sole per tele-aganto (ruĝa lumeto restas) signifas, ke la aparato daŭre bezonas ĝis 10 W (dum unu jaro: 87 kWh) Se vi samtempe havas radioaparaton, kiu malŝaltita tamen foruzas kurenton en la transformatoro (se aŭdeblas brum-o!), tio signifas la saman perdon de elektra energio. Elektraj aparatoj kun horloĝo verŝajne same daŭre bezonas kurenton. Ekzistas mezuriloj, kiuj mezuras la trafluantan kurenton kaj adicias la uzatan energion; kutime vi povas pruntepreni tian aparaton je via kurento-liveranto. Bv. mezuri viajn aparatojn - kaj decidi kio necesas. Kelkfoje aĉeto de nova aparato ŝparas multe da energio (ekz-e je fridujo).

Pri la Verdaj Partioj:

ekzistas pluraj tradukindaj tekstoj - bv-u sinprezenti al la AVE-sekretario tradukistoj el la angla, franca aŭ germana (senpage). De la Eŭropaj Verduloj ni ricevis Rezolucion pri okupo, kion verkis la "Verda Eŭropo-Pinto pri Okupo" en Luksemburgo je la 8-a de Novembro 1997.

La temo estis: "Okupo - Solidaro - Ekologio - Demokratio". La teksto - du densaj paĝoj - estas angle, eble ankaŭ germane.

Krom tio ni havas diversajn temajn informilojn: pri ekologia ekonomio; pri trafiko-politiko;

kaj la Komuna Verda Manifesto por la E~uropaj Balotoj 1999

la celoj koncize:

* Ekonomiaj kaj socialaj reformoj direktantaj al evoluo da~urigebla por la naturo kaj la homoj.

* Interplekto de merkato, medio, sekureco kaj Homaj Rajtoj en kadre de konstitucia procedo.

* Altaj standardoj kiuj difinas la viv-kvaliton en ekologio, sociala vivo kaj Homaj Rajtoj.

* Solidareco, garantiitaj Homaj Rajtoj por ^ciuj kaj ne-militaran eksterlandan politikon por sekurigi pac-plenan kunekzistadon.

* Plibonigitaj strukturoj por demokratia partopreno je politika decidigo.

La E~uropaj Verduloj laboros politike favore al tiuj celoj – kontra~u kreskantaj e~uro-skeptikeco kaj naciismo.

^Cu iu pretas traduki unu de tiuj tekstoj en Esperanton ?

Printempe 1999 okazos la kongreso de EFGP (29 partioj el 27 landoj) en Parizo. Tie AVE certe partoprenos per informa tablo. ^Cu ni anka~u povus prezenti Esperanton en konciza kurso ? Ni ricevis la sekvan mocion de Charly Dumont por la okazo de la kongreso de la E~uropaj Verduloj, printempe 1999 en Parizo:

Post kompleto da vo^cdonoj favore al Esperanto la komisiono Esperanto de "Les Verts" (la francaj verduloj) stagnas.

Kial ? ^Cefe ^car oni ne volas fari praktikajn pa^sojn, kiel la sistema sendado de dulingvaj tekstoj (franca kaj esperanta) al eksterlando. Ne provante politikon favore al Esperanto, ni ^ciam restos malanta~u la angla lingvo.

Tial ni proponas la sekvan mocion en direkto de la verduloj: Por eviti neutilajn kaj vanajn elspezojn la CNIR de Les Verts decidis:

1-e: La unua lingvo de la kongreso estos la angla.

2-e: Tiuj kiuj ne volas paroli la anglan, rajtas uzi siajn gepatrajn lingvojn; sed por ^spari kreskantajn kostojn por interpretistoj, ili estos interpretataj en Esperanton.

3-e: ^Car nun estas sufi^ce da tempo por lerni Esperanton, tiuj (sub 2) povus kompreni la esperantan tradukon.

La "Haifa Connection" estas nova verda partio en Israelo; ilia celo estas gardi la naturajn resursojn.

Je balotoj en Hamburgo, Germanio, la Verduloj ricevis 13,9% en '97 (post 13,5% en '93) - ili nun regas koalicie kune kun la SPD.

En Germanio ^cijare estos federacia baloto; Ligo 90 /La Verduloj alstrebas koalicion kun la SPD por ^san^gi la politikon al pli da~urigeblan, pli socialan kaj favore al pli bona divido de la laboro.

Ni (la sekretario estas ilia membro) volas enkonduki eko-impotojn por redukti la kromajn kostojn de la labor-lokoj. Kune kun la enkonduko de la E~uro-mono necesas harmoniigo de la imposto-sistemo por eviti perdon de impostoj fare de la ri^culoj kaj grandaj entreprenoj. (por ili necesas tutmonda imposto-sistemo !)

En Meksiko la verda partio PVEM faras dinamikan politikon rilate la protekto de la rajtoj de la indi^genoj.

En Norvegio en '97 oni elektis pli "verdajn" registaron; la medio-ministrino nomi^gas Guro Fjellanger. (Claude Rouget)

En Ukrainio la Verda Partio estis registrita por la parlamenta baloto en marto 1998. AVE deziras rimarkeblan sukceson.

Anonco:

Mesa^go al la Mondo. Parolado de la tribestro Seattle en 1856. (1984, reduktita versio, sampa^ge en la angla kaj en Esperanto), gravura^joj (2 NLG).#

Hartmut Gruendler: Vivo por la vero - Morto kontra~u la mensogo. (1997, en la germana !). Eseo pri la vort-elekto je la varbado por atomaj centraloj; kun siaj tekstoj pri senperforta politika agado (18 NLG).

Boris ^Svarc: Bazaj nocioj en kemio kaj solvo de kemiaj kalkul-problemoj. (1996, en Esperanto), klarigo de 17 nocioj (12 NLG).

Eldonejo Westermayer (sendokostoj 2 NLG, adreso vidu sube)

#####

Bv. informi min, se vi ne plu volas esti membro de AVE - Dankon.



Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)
UEA-konto (por kotizo au donacoj): avex-z

Sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62, DE-79194 GUNDELFINGEN
e-poshto: M.Westermayer@3Landbox.comlink.apc.org
hejma pagho (2020): <http://www.verduloj.org>

AVE-membroj -
la liguloj inter Verduloj kaj Esperantistoj

Ni pensas tutglobe

-
Ni agas surloke kaj regione.